



Kvar Esperanto-Eventoj en Kubo en Julio 2010.

Liba Gabalda

Kubaj esperantistoj havis ĉi-jare tre varman sezonon. Krom vere varmaga vetero ili ŝvitis ankaŭ pro la organizado de kvar ĉefaj Esperanto-eventoj, kiuj tie okazis somere. En la bela feriejo "Canimao" proksime al la urbo Matanzas okazis porinstruista ILEI konferenco kaj seminario. Sekvan semajnon oni ĝuis la 95-an Universalan Kongreson en la ĉefurbo Havano kaj samtempe okazis, ankaŭ en Havano, la 41-a Infan-junula Kongreseto en hotelo "Acuario". Lastan semajnon de julio la gejunuloj havis sian 66-an Junularan Kongreson en la bela ripozloko "Villa Trópico" en la regiono de Matanzas. Okazis ankaŭ antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj.

La eventoj malsimilis unu al la alia, sed pluraj aferoj estis komunaj: senproblema interkompreniĝo, plezuro lerni, interŝanĝi

ideojn, spertojn, motivigo al poresperanta agado, ĝojo renkonti gekonatojn kaj krei novajn amikecojn.

Mia edzo Floreal kaj mi ĝuis tri el tiuj-ĉi eventoj. Mi povas nur pozitive paroli pri ili. La etoso estis gaja kiel la kubana popolo. La riĉenhavaj programeroj abundis en ĉiuj eventoj. Altkvalitaj prelegoj alportis pliajn sciojn. En intensaj kursoj oni plu lernis kaj vesperaj artaj programeroj pliriĉigis nian kulturen horizonton. Kongresaj ekskursoj gvidis nin al interesaj kaj admirinde belaj lokoj de Kubo.

Ni havas belajn rememorojn kaj pozitivajn impresojn de tiuj-ĉi internaciaj renkontiĝoj. Kubo postlasis en ni deziron de baldaŭa reveno.



La 95-a Universala Kongreso de Esperanto

43-a Konferenco de ILEI kaj ankaŭ la 66-a IJK

Enhavo

La 95-a UK en Havano
Liba Gabalda paĝo 3a

LA INSULO DE NEMO (VI)
Johano Negrete paĝoj 4a kaj 5a

La 66-a Internacia Junulara Kongreso.
Liba Gabalda paĝoj 6a kaj 7a

Fotoraporto pri la Universala Kongreso de Esperanto.
Ricardo Coutinho paĝoj 8 al 15a

Mi bedaŭras la tempon perditan sen Esperanto.
Johano Negrete paĝo 16a kaj 17a (Unua Parto)

95-a Universala Kongreso de Esperanto. KUBO 2010.
Liba kaj Floreal Gabalda paĝo 18a

43-a Konference de ILEI. KUBO 2010.
Liba kaj Floreal Gabalda paĝo 19a

La vorto matenmanĝo.
Ramo Moraloj-Kastelo paĝo 20a

Esperanto sen interna ideo.
Ramo Moraloj-Kastelo paĝo 20a

Eta teksto pri mia naskiĝurbo.
Ramo Moraloj-Kastelo paĝo 21a

Kvar eventoj en Kubo en Julio 2010.
Liba Gabalda paĝo lasta

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene publikigitaj por laŭlegaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligis al ni la plibonigon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.



VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A
telefonnumero 58-0212.662.9224
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net

Redakcia Komisiono:
Johano Negrete, Esteban Emilio Mosonyi
kaj Ricardo Coutinho.

Grafikisto: Ramón Morales Castel.
(Ramo Moraloj-Kastelo).

Estraranoj:

Prezidanto: Johano Negrete.
Vic-Prezidanto: Juan Miranda.
Sekretario: Ricardo Coutinho.
Kasistino: Elizabeth Miranda.

Aldelegitoj:
Esteban Mosonyi
(Konferencoj kaj Interinstituciaj Rilatoj).
Nancy Aquino (Eldonado).
Aquiles Rivas (Biblioteko).
Silvana Messori (Instruado).

Kunlaborantoj:
Liba Gabalda.
Ramo Moraloj-Kastelo.

La 95-a UK en Havano

Liba Gabalda

Post dudek jaroj oni denove kongresis en Kubo. De la 17a ĝis la 24-a de julio 2010, okazis en Havano la 95-a Universala Kongreso de Esperanto. Sub tropika suno proksimume milo da esperantistoj el 59 landoj ĝuis neforgeseble agrablan kaj varman kongreson. Feliĉe povis partopreni ĝin ankaŭ multaj kubanoj kaj pluraj latinoamerikanoj. La inaŭguro estis kiel kutime solena kaj daŭris ĝis tagmezo. Ĉeestis ĝin, krom kelkaj ambasadoroj, la vicministro pri kulturo, kiu komence salutis nin en bona Esperanto. Kongreson salutis ankaŭ landaj E-reprezentantoj.

Ĉiam tre prezata estas la sabatvespera Movada Foiro dum kiu oni interkonatiĝas kaj informiĝas pri diversaj E-organizoj. La Kleriga Lundo kaj la Tago de la Lernejo ankaŭ altiras multajn interesulojn. Dum la kongresa semajno okazis seminarioj pri diversaj temoj kaj diskuttrondoj, kunvenoj, fakaj kaj sciencaj prelegoj, komitatkunsidoj, esperantologia konferenco, IKU, AIS, danc- kaj lingvaj kursoj, oratora kaj belarta konkursoj, aŭtoraj duonhoroj, aŭkcio, artaj aranĝoj, kaj aliaj interesaj programeroj. Estis pritraktita la kongresa temo - "Interproksimigo de kulturoj", kaj oni parolis pri lingva diverseco en Latinameriko. Prezento de Mez-Amerika kulturriĉeco de Gvatemalo kaj Meksiko estis akompanata per trafaj bildoj. Multnombraj prelegoj pri Kubo nin konatigis kun la geografio, la muzikiloj, la tradicia ĉemizo "gvajabero", la sansistemo, la alfabetiga programo kaj kun aliaj kutimoj kaj belajoj por pli bona imago de la gastiganta lando.

La kongresa kuriero nomata "Havana Karavano" raportis pri ĵusaj okazintaĵoj, kunvenaj raportoj, atentigis nin pri certaj programeroj, diversaj anoncoj, aldonaj aliĝantoj ktp. Oni intervjuis plurajn geesperantistojn. Pri la evento ĉiutage raportis kuba televido kaj radio. Ankaŭ en gazetoj aperis artikoloj pri nia kongreso.

Estis elektita nova estraro, sed Probal Dasgupta daŭrigos sian prezidantecon. Dum akcepto en la hotelo "Habana Riviera" la

vicministro pri la kulturo interŝanĝis donacojn kun la prezidanto de UEA. Antaŭ la fino de la kongreso okazis KER ekzamenoj. Elstaraj aktivuloj de Esperanto estis premiitaj en la fermo de la UK. Al kubanoj estis ofertita kupono por ke ili povu aĉeti librojn aŭ aliajn esperantaĵojn en la libroservo. Paralele la gejunuloj havis sian propran programon en la hotelo Neptuno.

Amasan partoprenon kaj grandan intereson vekis la kulturaj kaj turismaj programeroj. Ni konatiĝis kun kuba kulturo, havis okazon sperti la ĉiutagan vivon de kubanoj kaj spekti la naturan belecon de la lando, ĝui maron kaj sinceran akcepton kaj helpemon de ĉiam gajaj kubanoj. Urbaj promenoj permesis malkovri ne nur la kolonian arkitekturon, pitoreskajn lokojn, sed ankaŭ la ĉiutagan vivritmon de kubanoj. Tuttagaj ekskursoj al belaj lokoj ebligis admiri la belegan naturon, la penigan vivon de kamparanoj kaj la lukson de la konata feriejo Varadero.

La kubanoj sukcesis aranĝi buntajn kulturajn aranĝojn. En ĉiutaga posttagmeza kabaredo oni instruis danci la ŝatatajn "salsa", "merenge" kaj aliajn kubajn dancojn. La E-muzikgrupo "Amindaj" animis kaj gajigis la ĉeestantojn. Montriĝis, ke ne nur kubanoj, sed ĉiuj lantinamerikanoj estas denaske ritme dotitaj. Aperis onidiro, ke pro la muziko la kubanoj ne havas tempon kuiru komplikajn manĝaĵojn. Do, rizo kun fazeoloj estas la ĉefa ĉiutaga manĝo. Kontraste, la bankedo ofertis plurajn pladojn por kontento de la partoprenantaj esperantistoj. La balo en latinamerika ritmo ĝojigis ĉiujn dancantojn.

Inter vesperaj kulturaj programeroj mi citas: nacian vesperon, teatraĵon, koncerton de "Interkant", internacian artan vesperon. Neforgebla kaj bunta estis la nokta spektaklo en la plej fama kabaredo de Kubo "TROPICANA". Ĉe la fermo de la UK intervenis kvardeko da entuziasmaj infanoj, kiuj havis sian kongreseton ankaŭ en Havano. La kongreso estis plensukcesa kaj gaja, kiel kubanoj mem. Ni ĝuis belajn tagojn.



LA INSULO DE NEMO (VI)

Johano Negrete

Capitro 6 (Surmare al Pajklana)

Pasis kelkaj tagoj plu en la insulo de Nemo, eble ses, kaj niaj protagonistoj, kiuj feliĉe vivis en sentempa sinfonio, ankoraŭ ne imagis la finon de tiu gepara renkontiĝo. Estis matene frue, kiam Nemo eliris el la gastejo por fari aranĝojn kun iu lokano pri veturado perboate ĝis la proksima koralala insuleto, kies nomo en tiu ĉi lando estas kajeo. Li iris tiam ĝis la marbordo por lui boaton dum Munja restis en la gastejo-ĉambro preparinte la maran ekskurson.

Hodiaŭ la geparo decidis pasigi la plej parton de la tago en la kajeo Pajklana kvazaŭ senhoma, ĉar vere malmultaj personoj vizitas ĝin dumsemajne por sunbani sin kaj naĝi. La vetero montriĝis klare kompatema kun ilia plano, 32 gradoj, kvankam normale en tiuj etaj kajeoj de la ĉirkaŭaĵo, kaŭze de la tipa malalta kaj abunda vegetaĵaro, kie regas la mangloj, kiuj sin nutras el sala akvo per radikoj submaraj, kun malpli da palmoj kaj multe da blankema sablo, tie la temperaturo estas iom pli alta ol en la pli granda insulo de Nemo.

La marakvo tamen bele verdiĝas en Pajklana kaj, malgraŭ la brilo de minimumaj punktoj surface, steleske surmare, la akvo tute travideblas kiam oni eniras ĝin, kaj oni povus pasigi agrablajn momentojn nur rigardante la multnombro da fiŝoj plurkoloraj, kiuj trapasis malrapide trankvilaj antaŭ oniaj vizagoj. Precipe reliefas la beleco de tiuj plej karaj blukolaraj kaj grandokulaj, loke nomitaj "lorofiŝoj", tio estas, papago-fiŝoj, kiuj ŝajnis okulplendi al la naĝistoj kial ili audacas rompi la matenan harmonion plaŭdante intempeste sur la akvosurfaco.

Revenis Nemo al gastejo kun novaĵo pri la boato. Efektive, laŭ akordo kun la boatisto Laŭtaro, la geparo estos veturigata al Pajklana kaj forlasita tie. Poste je la kvina kaj duono revenos la boatisto por repreni kaj reporti la geparon al insulo de la gastejo. Nemo volis sin

certigi, ke la boatisto revenu al Pajklana response kaj akurate por preni lin kaj Munja-n, ĉar tia estas la kutimo normale praktikita de la tieaj boatistoj. Antaŭ atingi kajeon Pajklanan la boato ankaŭ vizitos du kajetojn kaj alian mezgrandan nomitan Varadero.

Pasis kvardek minutoj kaj jam Nemo kaj Munja estis pretaj kun ĉiuj aĵoj enmane en la ligna haveneto por enboatigi kun Laŭtaro. Post la prezentado de Laŭtaro al Munja, Nemo helpis ŝin komplezeme subeniri la boaton kaj ŝi montris sin tre kontenta. Ĉar se bone li jam familiariĝis kun tiu ĉi medio de koralaj kajeoj kaj tropika vegetaĵaro, male Munja ne havis sufiĉe da kontaktoj kun tiu ĉi speco de pejzaĝo, kaj nur unufoje kelkaj jaroj antaŭe ŝi vizitis la tropikan regionon de la Kariba Maro. Do, tiu ĉi stilo de pejzaĝo kaj markoloro, foje verda foje blua, estis preskaŭ tute nova al ŝia gusto, pro kio ŝi multe miris ĉi-tempe pri la pureco de la sablo kaj la kristala travideblo de la funda vegetaĵaro.

La suno estis agrabla, kun venteto milda, kaj molaj ondoj en la bordo. Kelkaj foraj nubetoj ĉe la horizonto ne minacis pluvon sed nur akompanis la rideton de la ĉielo. La geparo startis en la motora boato unue ĝis kajeo Pelono. Laŭtaro starante stiris la veturilon de malantaŭe. Li estis brunulo mezstatura, bonhumora, pli malpli 36-jara, kaj kun vizaga aspekto de indiano, tipa laboristo de boatoj en simplaj vestaĵoj: mallonga pantalonon, t-ĉemizon kaj sandaloj kaj la necesa ĉapo, same kiel niaj ĉapitaj protagonistoj. Ĉiuj devas protekti de la forta suno, kiu banos ilin pacience kaj senindulge la tutan tagon!

Dum la boato avancis tranĉante la akvon, Nemo ĝuis rigardi la rozkoloran vizagon de Munja kaj la fundon de ties bluajn okulojn, pli inunditaj de la lumo de la enamiĝo. Ŝi sopiris al la ĉielo pro la bela promenado kaj la penetranta rigardo de Nemo,

LA INSULO DE NEMO (VI) Johano Negrete

kiu fronte al ŝi tute esploris silente ŝiajn movojn. La okuloj de Munja saltetis inter la mara pejzaĝo kaj lia rigardo, kaj foje la sama boatomovo spruciĝis ŝiajn harojn dum ŝi ridetis. Tute ĉarma ŝi estis tiumomente –trovis Nemo- en plena akordo kun la grandeco de la pejzaĝo. Ŝi rimarkis tion kaj tuj pliiĝis ŝiajn koketajn gestojn per okuloj kaj lipoj, sciante, ke ŝi estis objekto de granda miro, kio kompreneble alportis al ŝi ĝojon. Dum ambaŭ fikse spektis unu al alia, finfine si ne rezistis la defion de tiu okula streĉado kaj demandis meze de kurioza rideto:

— Kion vi rigardas?

— Nenion kaj ĉion. Mi ne scias kiel diri, ĉar mi estas plena de miro kaj simpatio. Vi estas belega meze de tiu ĉi impresa pejzaĝo.

Kaj ŝia rideto ombriĝis subite kaj vanuis, la okuloj turniĝis al la maro esprimante linion de pudoro, dum la jama sunroza vizaĝo de la virino rudiĝis pli rapide pro la impeto de lia miriga rigardo. Eble samkiel sparko venis al si la ideo, ke tiu ĉi ĝoja ferio baldaŭ dissolvigos en la nenio.

Kajeo Pelono jam estis fronte a la boato. Laŭtaro malakcelis kaj direktis ĝin tute singarde al la sablo. Ĝuste kiam la boato surtrandis, la geparo elboatiĝis dum Laŭtaro restis en ĝi. Kajeo "Pelono" tiel nomita, ĉar ĝi estis eta kaj ronda kaj senvegetaĵara, do senombra, kie la sablo kompareblas kun la nuda haŭto de la kapo. Nemo kaj Munja saltete kuris ĝis la centro de la eta cirklo kun siaj dorsakoj por esplori la tutan lokon. Neniu alia persono en la kajeo ĉi-momente, neniu alia boato. Nur sablo kaj maro ĉirkaŭis. Post kelkaj minutoj de promenado en la insuleto ili decidis kusi kaseme de Laŭtoro en la kontraŭa marbordo dum mallonga restado.

Ŝi demetis sian bantukon, ĝis tiam nodita al sia talio, sian t-ĉemizon, preparis la tukon por kusigi sin, reprenis la ĉapon, kaj etendis surbruste sian korpon, envolvita en blua banvesto kun altaj tranĉaĵoj en la koksoj, tiel ke ĝiaj streĉaj linioj montris sufiĉe la rozkolorajn koksojn kaj gluteojn. Nemo ankaŭ

faris same kun ŝia bantuko kaj eksidis apude de ŝi kun banpantalonon kaj ĉapo, trankvile, sed evitis fikse rigardi ŝian reliefantan postaĵon.

Kiel bone, nun ni solaj en tiu ĉi insuleto! En Europo vi ne povus trovi ĉi tion. Ne, malkrom ke oni estu Aristoteles Onassis — diris Nemo.

Jes, vere. Do, kion povas fari nun ni du tute solaj, karulo?— demandis ŝi iomete moke.

Kompreneble rigardi la belan maron kaj enspiri tiun freŝan aromon de koralmaro. Ĉar birdoj ne vizitas tiun ĉi kajeon.

Aha, vi venis nur por rigardi la maron!

Vi scias ke ne, sed tamen... mi ne scias kion vi proponus.

Mi supozas, ke ĉio ĉi estas tiel belege, ke ni ne devus fari ion ajn ol resti ĉi tie la tutan tagon, atendente, ke iu kompatema birdo degnu viziti nin.

Aŭ atendente, ke iu kompatema viro degnu frapi vian provokantan postaĵon. Mi ne pardonos ĝin— Kaj kiel dirite tiel farite. Nemo rapide donis per manplato surglutean baton al tiu ĉi plej defianta monteto de la kajeo.

Aj! Vi malbonulo! Gi doloris.— Si leviĝis por sin defendi kaj responde pinĉis la aŭdacan antaŭbrakon de Nemo. Malbonulo!— Siaj okuloj aspektis tipaj de malforta infanino, plendema kaj montrante knabinan indignon, kies postaĵo ŝajne estis ofendita duonserioze aŭ duonserce de impeta amanto, kiu ŝajne trapasis la limojn de deca konduto.

Eksidu ĉi tie apud mi, kara. Ne genu. Estis nur serco.— Kaj dum li brakumis por rekusiĝi sin daŭriĝis la senkulpigon— Mi amas tiun postaĵeton nun erare ofendigita sen vera kaŭzo. Ĝi ĉiam provokas min kaj mi ne povas rezisti frapeti tiel, kara mia— kaj denove li frapis la alian gluteon, kvankam ĉi-foje pli softe kaj knedis ĝin delikate — Por ke ne jaluzu la alian mi kisos nun la ofendigitan belan kaj karnorican rondecon.— Por tio li sekve aplikiĝis por atingi la ekscitan parton.

Mi ne ofendigos, se vi deziras kontentigi ilin. Estas ĵuste.— Diris Munja, kaj anhelante ricevi karesojn kaj retrovi la amludon ŝi kisis lin.





La 66-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Liba Gabalda

La lasta, kvara Esperanto-evento en Kubo - IJK okazis tuj post la 95-a Universala Kongreso, la lastan semajnon en julio, en la bela ĉemara turismejo "Villa Trópico" en la regiono de Matanzas. Ĝi situas mezdistance inter la ĉefurbo Havano kaj konata feriejo Varadero. Al la kongreso aliĝis 133 geesperantistoj, sed lastmomente aldoniĝis kelkaj pliaj. Bonŝance multaj latinamerikanoj havis unikan okazon partopreni la eventon. Krom kubanoj venis gejunuloj el Argentino, Bolivio, Brazilo, Dominika respubliko, Haitio, Meksiko, Nikaragvo, Peruo, Venezuelo. Tiel ekestis bunta mozaiko el diversaj landoj.

LKK-anoj zorgis pri transportado. Ĉe la alveno ni estis regalitaj per koktelo. Muzikistoj bonvenigis nin per tipaj kubaj kantoj. Amuza virino (travestita viro) invitis al dancado.

Pro la situo la kongreso estis iom pli ripoziga ol kutime. La fiksitajn programerojn oni kompletigis surloke per kelkaj aldonaj. La gejunuloj pasigis multe da tempo gaje amuziĝante ĉe la naĝejo. Okazis pilkludoj naĝejaj kaj herbejaj. Krome oni ĝisate profitis la maron. Ĝi estis ideala loko ne nur por naĝi, sed ankaŭ por observi submaran riĉecon de fiŝoj kaj koraloj en proksima koralrifto. Iuj profitis promenadon sur pedalŝipoj aŭ nur simplan sunumadon en ombro de kelkaj arboj kaj palmoj.

La ofertitaj servoj entenis trifojan tagan manĝadon, libervolan servon ĉe la trinkejo, prunton de necesaj akcesoraĵoj por subakvigado, plaĝtukojn... Ni loĝis en komfortaj bangaloj panorame al maro. La apuda naturo de verda monto invitis al grimpadon. Dum la promeno ni vizitis proksiman vilaĝon, kie ni gustumis kelkajn fruktojn kaj kokoson. Junuloj havis siajn komitatkunsidojn kaj prelegojn. Ĉe la komenco Marek Blahuš klarigis kio estas E@I, konatigis ĝiajn principojn kaj prezentis ties ambiciajn projektojn. Amri Wandel parolis kaj skizis la historion de TEJO - "Kiam, kiel, kial". De Franklin Montenegro ni eksciis pri Yamar -

Festo. La gejunuloj ŝatis diversajn danc- kaj lingvokursojn.

Tre interesa estis la Lingva Festivalo okazinta surloke ĉe la naĝejo. Oni prezentis pli ol dek lingvojn. Brazilanoj aldone invitis al "edziĝfesto - kvadrilo" (brazila kampara danco), kio estis gaja okazaĵo por ĉiuj ĉeestantoj. Paro el Danio regalis nin per tipaj produktoj: pano, fromaĝo, fiŝaĵo kaj likvoro. Ankaŭ rusoj regalis nin per kelkaj specialaĵoj: vodko kaj kaviaro. Aliaj proponis kelkajn surlokajn frandaĵojn. Meksikanoj, krom bela ekspozicio de memoraĵoj kaj kelkaj bongustaĵoj, prezentis tipan meksikan dancon. Ili estis bele kostumitaj. Koreoj instigis al kaligrafia skribado. Marek kaj mi prezentis la ĉeĥan lingvon. Kubanoj gaje dancis.

La vesperaj programeroj okazis en teatrejo, kie oni poste povis "ĝui" noktan diskotekon. Interesitoj povis rigardi esperantigitajn filmojn. Ĝis malfruaj horoj funkciis la kutimaj "gufujo" kaj trinkejo ĉe la naĝejo. Tio sub tropikvarma kaj stelĉiela nokto estis agrabla okazo por babilado.

La hotelo dufoje proponis kaj organizis por ni profesian, kabaredan spektaklon kun muzika akompano. Ankaŭ la E-muzikgrupo "Amindaj" havis okazon prezenti sin kaj dancigi la ĉeestantojn. Dum la planita ekskursita tago, unu tuttaga ekskurso celis la proksiman urbon Matanzas kaj la alia vizitigis al ni Havanon. Dum nia restado ni spertis ankaŭ fortan tropikan pluvegon, dum kiu elbordiĝis la rivero kaj makulis per nigraj akvoj kaj malpuraĵoj la maron. Tamen, la sekvan tagon la maro denove helbluis. Ravaj estis la vesperaj sunsubiroj, kiuj kolorigis la ĉielon kaj la strandon ruĝe. Dum la IJK ni ĝuis trankvilon ĉe la bela plaĝo, bonajn manĝojn kaj gajan junulan etoson.



La 66-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO Liba Gabalda



66-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO



KUBO



24 - 31 JULIO 2010



Fotis kaj aran is Liba kaj Floreal Gabalda



Fotoraporto de la Universala Kongreso de Esperanto

Ricardo Coutinho

Fotoraporto pri la ĉi-jara 95-a UK en Havano



Inauguración del Congreso Universal de Esperanto.
Malfermo de la Universala Kongreso de Esperanto.

Salutación de Venezuela, hecha por Ricardo Coutinho.

Salumensaĝo de reprezentanto de Venezuelo.

Georgina Almaza, actriz y cantante cubana, declamado "Ho, mia kor", poema escrito por Ludoviko Lazaro Zamenhof, iniciador de la lengua.


Georgina Almaza, fama kuba aktorino kaj kantistino deklamis "Ho, mia Kor", farita de Zamenhof.



Coral Infantil cantando.
Infana Koruso kantis dum la malfermo.



Charla de los espiritistas.
Prelego de Spiritistoj.



El profesor Humphery Tonkin, catedrático de literatura inglesa e integrante de la oficina de relaciones consultivas de UNESCO explicando la importancia de las relaciones de la Asociación Universal de Esperanto con la ONU y UNESCO.

La profesoro Humphery Tonkin, specialisto pri angla literaturo kaj membro de la oficejo pri interrilatoj de UEA kun la UNESKO prelegis pri la graveco de la interrilatoj inter UEA, UN kaj UNESKO.



Eugène Ionesco con su drama comedia "La Leciono" (La Leccion) durante la "Tarde Internacional".

Eugène Ionesco faris komedion nomita "La Leciono" (La Leccion) dum la "Internacia Vespero".



Fotoraporto de la Universala Kongreso de Esperanto

Ricardo Coutinho

Fotoraporto pri la ĉi-jara 95-a UK en Havano



Una coral internacional compuesta por personas de mas de 15 países, la cual nos deleitaron con el Canto General de Pablo Neruda y Mikis Theodorakis Inerkant.

Internacia Koruso kantis Generalan Kanton de Pablo Neruda y Interkant-n Mikis Theodorakis, en tiu ĉi koruso partoprenis kantistoj el 15 landoj.



Representantes de Radio Polaca: Bárbara Piertzak y representante de Radio Aktiva del Uruguay: Ana Rizo.

Pola Radio: Bárbara Piertzak.
Radio Aktiva el Urugvajo: Ana Rizo.



Representante de la Radio China: Mirinda
Ĉina Radio: Mirinda

Conferencia sobre las radios en esperanto y aquellas que poseen secciones en esperanto.
Konferenco : Radioamatoroj.



Vilhermo Lutermano: Conferencia de MAS, foro abierto sobre ideas de izquierda que pueden mejorar las relaciones humanas en el mundo, editan libros de corte marxista y otros temas. Lutermano es el responsable de *Le Monde Diplomatique* en esperanto. // Vilhemo Lutermano: Prelego de MAS, forumo malfermita pri la maldekstraj ideoj kiuj povas plibonigi la homajn interrilatojn, eldonas librojn speciale pri marksismo. Lutermano estas respondeculo pri *Le Monde Diplomatique* en Esperanto.



Stefan MacGill: especialista en enseñanza en esperanto y presidente de ILEI (Instituto de Profesores Esperantistas) hablando de sus nuevas investigaciones.

Stegan MacGill: specialisto pri Instruado de Esperanto kaj prezidanto de ILEI parolante pri liaj novaj esploradoj.



Antonio Vergara; especialista en epidemiología, da una charla sobre Importancia de la Medicina ancestral y la necesidad de respeto por parte de la medicina occidental para con ella.

Antonio Vergara; specialisto pri epidemiologio, prelegis pri la Graveco de la Medicino de la indiĝenoj.



Fotoraporto de la Universala Kongreso de Esperanto

Ricardo Coutinho



Foro sobre ecología y su importancia en las ciudades. Forumo pri Ekologio kaj la graveco de ĝi en la urboj.



Baile brasileño para bodas en el Congreso Juvenil de Esperanto. Brazila Edziĝodanco dum la JK.



Traje típico mexicano en el Congreso Juvenil. Meksika Kostumo dum la JK.




México – Meksika Budo dum la JK.



Francia - Franca budo dum la JK.

Fotoraporto pri la ĉi-jara 95-a UK en Havano



Corea - Korea budo dum la IJK.



Bélgica y Polonia. Belgio kaj Pollando dum la IJK.



Baile Mexicano – Meksika Danco.



Mario del Perú tocando en el Congreso Juvenil.

Mario Donayre, reprezentanto de Peruo ludis fluton dum la JK.



Fotoraporto de la Universala Kongreso de Esperanto

Ricardo Coutinho

Fotoraporto pri la ĉi-jara 95-a UK en Havano



Reunión de la Organización Juvenil de Esperanto.
TEJO-Kunveno.

Baile y comedia cubana. / Kuba komedio kaj danco.



Logotipo del Congreso. / Kongresa logotipo.



Feria de Libro. / Libro-Servo.





Mi bedaŭras la tempon perditan sen Esperanto (Unua Parto)

Johano Negrete

Mi alvenis al la Esperanto ne subite, ne rapide, sed sub la influo de diversaj momentoj. Kun facileco mi povus diferencigi tri momentojn de mia rekontiĝo kun Esperanto, ĝis akiri la bezonon tute sin dediĉi al la internacia lingvo.

Unue unu rimarko. Ne plaĉas al mi paroli pri mia vivo aŭ sperto, kaj tio ne dependas de modesto, sed de kompetento. Ĉar se temas pri mi mem sen iu difinita celo, kiel ekzemple akiri konon au pripenson, mankas al mi vortojn, eliras la inspiro, kaj sen plia analizo mi vere sentas malkonforta. Tamen se temas pri informado aŭ eltiro de konkludoj kaj mi devas uzi la propran sperton, tiam mi trovas la motivon kaj klopodas paroli pri mi kun difinita celo, tiel kiel mi diris. Pro tio mi sin devigas ene de tiu ĉi artikoleto fari memprezentadon kaj uzi la propran vivsperton de mia rekontiĝo kun Esperanto per tri fazoj. Kaj mi esperas, ke ĉio ĉi povus servi kiel utilaĵojn por eltiri konkludojn rilate al la manieroj, laŭ kiuj ni esperantistoj trovas aŭ malkovras Esperanton.

Do, mi komencos ekde mia naskiĝurbo La Laguna, en la insulo Tenerifo de la Kanaria Insularo de Hispanio, situanta en la Atlantika Oceano, kvazaŭ geografia peco de Afriko. La Laguna estas konata en Esperantio, ĉar en ĝi fama esperantiano kiel Juan Regulo Pérez loĝis kaj laboris internacie por Esperanto kaj kiel eldonisto publikigis centojn da novaj kaj nun klasikaj literaturaj verkaĵoj en la kolekto de *Beletraj Kajeroj de Stafeto* (grava eldonejo).

En mia infanaĝo mi aŭdis pri dumnokta kurso de "universala" lingvo Esperanto en la oficiala liceo direktita al lalagunaj plenkreskuloj ĉar ĉeestis ĝin unu el miaj najbarinoj. Mi estis dekonujara. Bedaŭrinde ne montris mi ankoraŭ bezonon je tiu lingvolernado, ĉar ekokupiĝis kun la

lerneja latino, sufiĉe kompleksa tiutape. Tamen en La Laguna, danke al tri reliefaj universitataj profesoroj, D-roj Juan Regulo Pérez, Jesús Maynard Duplá kaj Elías Serra Rafols, kreskis tre entusiasma kaj aprezata movado ĉirkaŭ tiuj tri figuroj, kiuj fondis katedron de Esperanto en la Universidad de La Laguna, krom la eldonejon *Stafeto*. Dum tiuj jaroj 1953-1960 mi nur okupiĝis pri mia sesjara periodo kiel liceano, lerninte pri la francan kaj anglan, kaj private iom da koketemo kun la araba. Sed tuj poste mi elmigris al Venezuelo, kie multaj jaroj pasis sen ke mi denove aŭdis la vorton "Esperanto".

En Karakaso mi studis en la fakto de Filozofio de la Universidad Central kaj en 1966 diplomiĝis. Dum tiu periodo devis aprobi kursojn pri la latina, la greka kaj germana. Do, mi turniĝis ĝenerale amatoro pri lingvolernado. Post diplomiĝo eklernis la italan, kaŭze de stipendio por studi la klasikan grekan lingvon kaj filozofion en la propra Italio. Tamen mi ŝanĝis la ideon, rezignis la stipendion kaj komencis profesie instrui filozofion mialande ĝis la momento, kiam alvenis alia stipendio por studi logikon en Usono. Tion mi plenumis kaj dum tri jaroj kaj duono, kiujn mi pasis en Indiana University, havis la ŝancon ĉeesti Internacian Kongreson de Sociologio en la urbo Toronto de Kanado, kie mi vere havis tute hazarde mian unuan rekontiĝon kun Esperanto.

Kiel tio okazis? En 1974 dumsomere kaj en kunsideto de la Kongreso pri la temo "Latinoameriko je la fino de la milito en Vietnamo" subite ekleviĝis amara diskuto pri la kongresaj lingvoj; ĉar pluraj kubanoj ne cedis en sia celo prelegi hispane, argumentante, ke la kongresaj lingvoj estis la samaj de

Mi bedaŭras la tempon perditan sen Esperanto Johano Negrete

Unesko (5 naciaj lingvoj). La debato-vidanto malpermesis la hispanan, kaj tiam intervenis aliaj sociologoj, iuj favore al la hispana kaj aliaj malfavore. La diskuto estis forta, kaj oni metis finon al la kunsido kaŭze de ke la ekvilibro malaperis. La rezulto, estis laŭ mia opinio, eksterordinara. Ŝajnis al mi, ke la kubanoj perdis sian pretendon, sed ne. Kun surprizo mi konstatis je la fermo de la Kongreso, ke finfine ili prelegis hispane en la grandega salono antaŭ preskaŭ 4.500 kongresanoj.

Tamen, post tiu konflikta diskuto pri lingvaj rajtoj, mi eliris el la saloneto tute impresita de tia lukto kaj unuafoje pripensis la aferon de lingvo-konkurenco kaj politika lingva rekono. Gravis la psikologia sinteno antaŭ la situacio. Multfoje homoj imponas lingvon sur aliulon sen nenia rezisto, aŭ sen ke ĝi estu klare manifestita. Kaj la dilemo estas inter aĉcepti la ludoregulojn de aliulo aŭ persisti en la propra lingvo kiel esprimilo. Multfoje konsistas en lukto de karakteroj aŭ de propra volo ne lasi sin imponi alian lingvon.

Hazarde promenante tra koridoro de la kongresejo troviĝis kelkaj tabloj kun oferto de libroj kaj revuoj. Tie mi observis revuon kun la titolo **La monda lingvo-problemo**, kiun mi tuj aĉetis incitita de la ĵusa diskuto. Foliante, mi provis legi strangan ĉeflingvon, kun multaj latinaj vortoj, sed baldaŭ suspektis, ke tiu lingvo devis esti Esperanto aŭ eble unu el la jugoslavaj lingvoj. Do unuafoje mi observis la esperantan eskribadon, kvankam ne sciis prononci kelkajn literojn, mi povis persperte interpreti ion, ekzemple, "tabelo de enhavo" "resumo", "enkonduko", la titolon, ktp. Baldaŭ notis la logikecon de la pluraloj kaj gramatikajn trajtojn. Multaj jaroj pasis kaj mi konservas ankoraŭ tiun ekzempleron, mian unuan

instigilon por unu internacia lingvo pli facila kaj regula kaj pli profunde demokratia. Ankaŭ mi sentis profesie, ke tiu esperanta lingvo aspektis tre teknika kaj pro tio ankaŭ taŭga por la filozofia pensado. Do, Tia speco de lingvo estintus tre utila en la konfronto de la menciita saloneto.

Pluraj konkludoj miaj de tiu debato pri lingvaj rajtoj estis sendube la jenaj: (1) estas manko de sufiĉa ribelo kontraŭ okulfrapaj kazoj de lingva diskriminacio, ĉar inter latinoamerikanoj nur la kubanoj protestis. Krome, (2) tia indiferento dependas de tiu fakto: la lingva konscio estis kaj estas unu el la malpli disvolvitaj temoj ĝis nia tempo. Oni parolas pri homaj rajtoj sen sufiĉe enfazo pri lingvaj rajtoj, des malpli se oni laboras en akademias etosoj; (3) Ekzistas malscio je la graveco de implicoj inter la uzado de unu aŭ alia lingvo en tia kongresa komunikado. Normale oni ne konsideras la alternativon ŝanĝi la dominantan lingvan *status quo*, kaj (4) ankoraŭ oni fidus kaj multe laŭdas la uzadon de interpreto kaj traduko en la internaciaj rilatoj.

Kun tiuj pripensoj mi donis mian unuan simpation al la ideo de internacia lingvo neŭtrala, kaj konservis mian aĉetitan revuon, kiu malkovris al mi la belon de tiu planita lingvo, kvankam ties prezentado estis limigata nur al la skriba kodo. Mi ne povis suspekti tiutempe la estontajn konsekvencojn de tiu renkontiĝo kaj la subkonscia influo, ke postaj jaroj ĝi plenumus sur mia emocian kaj intelektan vivon.

Notoj:

1) Mi prenis la frazon de artikoleto de Karesema (Lucia Marder) "Brazilan brakumon de Karesema"; FEMINA.N-ro 21, marto 2010; p. 16.

2) Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. (London, Rotterdam); Mouton, Vol. 4, N-ro 12, pp. 129-192, den Haag, 1972

Daŭrigota en la venonta numero



95a Universala Kongreso de Esperanto. KUBO 2010. Liba Gabalda kaj Floreal Gabalda

43a Koferenco de ILEI. KUBO 2010. Liba kaj Floreal Gabalda



95a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO



HAVANO - KUBO



17 - 24 JULIO 2010



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



La vorto *matenmanĝo* Ramo Moraloj-Kastelo

Kaj en la angla lingvo, kaj en la hispana, la vorto *matenmanĝo* havas la saman formon vorte: *malfasto*. Angle, la vorto "breakfast" estas kunmetaĵo el du radikoj: "fast" (kiu esperante estas la verbo *fasti*), kaj "break" (kiu havas iel en tiu vorto la signifon de la esperanta prefikso *mal*). Pro tio, la verbo "breakfast" estas laŭlitere *malfasto* aŭ *malfasti*. Oni ja povas uzi tiujn vortojn esperante, ĉar ĝi estas tute logika kaj klara, sed oni devas traduki "breakfast" per la verbo *matenmanĝi* kaj la substantivo *matenmanĝo*.

Hispane, same kiel angle, la verbo "desayunar" estas ankaŭ kunmetaĵo el du radikoj: "ayunar" (fasti, angle "to fast"), kaj la prefikso "des" (kiu havas iel ankaŭ la signifon de la esperanta prefikso *mal*). Pro tio, ankaŭ en la hispana, la signifon *matenmanĝi* oni esprimas per la vorto *malfasti*. Sed oni devas kompreneble traduki "desayunar" per la verbo *matenmanĝi*, kaj "desayuno" per la substantivo *matenmanĝo*.

En la germana, la signifo *matenmanĝo* estas iomete pli proksima semantike al la esperanta vorto. "Frühstück" estas ankaŭ kunmetaĵo: la ero "früh" havas

la signifon "ion frue farita", kaj la radiko "stück" (kiu signifas pecon). "Frühstück" estas "la frua peco (manĝaĵo)", tio estas: "la manĝaĵo plej frua de la tago". Sed same kiel okazas kun "breakfast" kaj kun "desayunar", oni traduku "frühstücken" per la vorto *matenmanĝi*, kaj "frühstück" per la vorto *matenmanĝo*.

La formo *matenmanĝo* estas pli simpla kaj pli logika ol *malfasto*. La manĝo de la mateno: jen *matenmanĝo*. Manĝi matene: jen *matenmanĝi*. Malfasti: ĉesigi la faston, "to break the fast", "romper el ayuno". Mi konas multon da hispaneparolantoj, kiuj uzas ĉiutage la vorton "desayunar" kaj neniel rilatigas ĝin al la frazo "ĉesigi la faston". Kaj mi konas ankaŭ multon da angleparolantoj, kiuj uzas ĉiutage la vorton "breakfast" kaj neniam rilatigis ĝin al la frazo "to break the fast". Esperanto estas tiel klara, ke oni povas ja diri *malfasti*, *malfasto*, kaj ĝi estas tute ebla je kompreno dekomence. Aliflanke, diri esperante "la frua peco" ja povus temi pri alia afero...



Esperanto sen interna ideo Ramo Moraloj-Kastelo

Esperanto sen interna ideo estas kvazaŭ korpo senanima, spirito nefajreca, heliko senkonka, ilo nenecesa, veturilo malbezona, domo sen loĝantoj, nigra fajro malvarmiganta, senluma stelo, suno sen lumradioj, libroj senŝpuraj, seksumado senama, anĝelo senflugila, inko akvigita, floroj senkoloraj, infano senreva, civitano indiferenta, arbo malfruktodona, frukto sensema, parolado malemocia, ponto forĵetebla, elpenaĵo nedisvastigita, mirindaĵo porĉiam kaŝita...

Esperanto sen interna ideo estas kvazaŭ lingvo sencela...

Ne forĵetu la internan ideon de Esperanto!
Ĝi estas la nevenkebla armilo paca!



Esperanto sin idea interna es como un cuerpo sin alma, un espíritu que no es de fuego, una babosa sin concha, un instrumento innecesario, un vehículo superfluo, una casa sin habitantes, un fuego negro que enfría, una estrella sin luz, un sol sin rayos de luz, unos libros sin señales, tener sexo sin amor, un ángel sin alas, una tinta aguada, unas flores sin colores, un niño sin sueños, un ciudadano indiferente, un árbol infértil, un fruto sin semillas, un discurso sin emoción, un puente desechable, un invento no distribuido, una maravilla escondida para siempre...

Esperanto sin idea interna es como un idioma sin propósito...

¡No deseches la idea interna del Esperanto!
¡Ella es el arma pacífica e invencible!

Eta teksto pri mia naskiĝurbo. Ramo Moraloj-Kastelo

Mi estas Sud-Amerikano. Mia nomo estas "Ramón Eduardo" (hispana nomo, prononcu esperante: Ramon'), sed mi uzas simple la nomon Ramo. Mi naskiĝis en eta urbo, en la orienta duono de mia naskiĝlando Venezuelujo. Tiu urbo nomiĝas hispane "Maturín" (prononcu esperante: Maturin'), kaj mi ŝatas nomi ĝin esperante Maturino. Ĝi havis pli-malpli ducent mil loĝantojn tiam, kiam mi naskiĝis. Tamen hodiaŭ ĝi estas pli granda urbo, havanta nun ĉirkaŭ sescent mil loĝantojn. Ĝi kuŝas sur plata altebenaĵo ene de la lando, malproksime de la marbordo, kelkajn kilometrojn norde de la planeda ekvatoro.

Maturino prenis sian nomon el franca nomo Maturin, nomo de kristana Sanktulo (la Sanktulo de la frenezuloj). Tio okazis tiel, ĉar kune kun la hipanaj koloniistoj, kiuj fondis tiun urbon, alvenis ankaŭ kelkaj francaj monaĥoj, kiuj baptis certan konatan indiĝenulon Maturin. Poste, la nomo de tiu indiĝenulo (la franca nomo, ne lia vera nomo denaska) estis akceptita kiel la nomo de la urbo. Maturino jam ne estas tiel juna, kiel oni povas pensi: ĝi festis, tiun ĉi jaron, ducent kvindek jaroj da ekzistado! Maturino estas, do, 250 jaraĝa!

Maturino estas bone konata pri sia varmo, vetera varmo. Se vi staras tute subsune en strato, inter la naŭa horo matene kaj la tria horo vespere, la temperaturo povas atingi 41° aŭ 44° centigradojn! Do, la homoj klopodas ĉiutage stari en mallumo, aŭ ene de la konstruaĵoj. Alia karaktero de mia naskiĝurbo estas la frenezeco de la vetero. Unue, mi devas ekspliki, ke en Venezuelujo ne okazas la kvar tipaj sezonoj: printempo, somero, aŭtuno kaj vintro. Ni havas tie ĉi nur du sezonojn po unu jaro: la pluva sezono kaj la seka sezono. Kaj ĉiuj el tiuj du grandaj sezonoj havas kvazaŭ etan sezoneton, kiu kelkajn jarojn okazas, kaj aliajn jarojn ne okazas. Dum la pluva sezono ni havas multon da pluvo, la riveroj kreskiĝas, la plantoj kaj arboj verdiĝas, kaj la aera temperaturo malsupreniras iomete. Je la seka sezono ni havas ne eĉ unu pluveton dum kelkaj monatoj! La temperaturo supreniras inferen, la plantoj kaj arboj velksekiĝas kaj la homoj kaj bestoj soifegas. Mi ne ŝatas la seka sezono. Mi preferas la pluvan sezonon!

Alia stranga eco de mia naskiĝurbo estas, ke ĝi ne havas altajn konstruaĵojn. La kialo estas la jena: kiam la urbo estis nur urbeto, tiam la flughaveno estis



Jen la mapo de mia Patrujo. La urbo plej norda nomiĝas Karakaso. Ĝi estas la ĉefurbo. Iomete orienten estas mia naskiĝurbo Maturino.



Jen la mapo de la norda parto de Suda Ameriko. Oni povas vidi kelkajn landojn najbarajn. Norde oni povas vidi Havanon, kie okazis ĉi-jare la 95-a Universala Kongreso de Esperanto.

borde de ĝi, sed nun, la urbo pligrandiĝis tute ĉirkaŭ la flughaveno. Tial la prikonstruaĵaj leĝoj de la urbo malpermesas konstrui altajn konstruaĵojn, ĉar ili estas danĝera por la flugtrafiko. Fakte, la domo kie mi loĝas estas ĝuste fronte de la flughavena ekflugejo. Mi aŭdas ĉiutage la laŭtajn kriojn de la aviadilaj maŝinoj, sed mi tute jam alikutimiĝis.

